

KKPS 3 forblovos vin!

Ne estu koko, venu al KKPS



Post unu KKPS en fortikejo kaj dua en bieno, la tria KKPS okazos ĉe la maro, en la taŭge nomata Kvartalo-ĉe-Maró de la **7-a ĝis la 9-a de novembro**. Kun pli plena programo ol iam ajn antaŭe, pli luksaj ĉambroj (dupersonaj!) aŭ pli grandaj rabatoj (en tendo!), kaj kun speciala oferto, kiun vi ne povos rifuzi.

Etosoplana programo

Krom la neforgeseblaj programeroj kiel koncertoj, trinkejo kaj urba ludo, tiu ĉi KKPS ofertas riĉan oferton da kursoj por ĉiu nivelo pro kunlaboro kun Esperanto Nederlando, kaj por pli spertaj membroj de NEJ, PEJ, ARCI, TEC, EAS, JEFO kaj EDE okazos trejnseminario pri merkatumado, kun repago de vojaĝ- kaj restadkosto. Nerifuzebla, ĉu?



Aliĝu tuj kaj planu vian vojaĝon

Wijk aan Zee troviĝas je 25 km de Amsterdamo, kaj estas plej bone atingebla el la flughaveno Schiphol Amsterdam. Malmultekostaj flugoj iras al Eindhoven, kaj multaj internaciaj trajnoj iras ĝis Amsterdamo.

Por aliĝi, plenigu la suban aliĝilon kaj antaŭpagu 20€ al Roĉjo aŭ Nico, aŭ aliĝu ĉe <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com> kaj ĝiru 20€ al nejk-r aŭ NL85RABO0147949424.

Persona nomo: _____ Familia nomo: _____

Naskiĝdato: ____ - ____ - ____ Sekso: _____ Loĝlando: _____

Retpoŝtadreso: _____

Mi manĝos: ĉion / vegetare / _____

Mi dormos: En tendo / en duopa ĉambro (kun: _____)

Mi antaŭpagas €20: Per bankĝiro/per uea-konto/kontante al : _____

Mi planas partopreni la seminarion kiel membro de NEJ/PEJ/ARCI/TEC/EAS/JEFO/EDE

Mi volas partopreni esperantan kurson dum KKPS.



Pos-Amiko

Somero 2014, Numero 9

INDEKSO:

1. Alta perfido en la estraro de TEJO!

2. Germanujo montras siajn organizajn kapablojn

2. Studo montras, ke oni ne manĝu kokojn

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj aperas kvarfoje en la jaro.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps->

klacxkunveno.wikispaces.com/

Pos-Amiko

Alta perfido en la estraro de TEJO!

La Pos-Amiko malkovris eblan perfidon en la plej altaj rangoj de TEJO, kiu estus laŭ severececo nur komparebla kun la Ido-krizo de la 1910-aj jaroj. Kelkaj atentemaj komitatanoj kaj aktivuloj eble rimarkis, ke lastatempe la estraro de TEJO estis malpli aktiva ol kutime, kaj kelkaj estraranoj eĉ tute aŭ preskaŭ tute ĉesis reagi al TEJO-rilataj mesaĝoj. Pro tio ankoraŭ ne pretas nova laborplano, nek Pasporta Servo, kaj eĉ la nova volontulo ankoraŭ ne estas anoncita. La afero ŝajnas mistera al multaj, sed diligenta esploro montras, ke je la 1-a de majo, ĉirkaŭ la momento kiam estraranoj komencis malaperi, estis elektita nova Cifal de Volapuko, Hermann Philipps. La logika konkludo do estas, ke li sukcesis fortiri ilin al la Volapuka movado. La estraranoj, kiuj en tiu ĉi maniero malaktiviĝas aŭ malaperis, estas Paweł Fischer-Kotowski, Nico Huurman kaj Alexandre Raymond. Ili ne estas kontakteblaj por komentoj, sed anonima aktivulo ĉi komentas: „Almenaŭ estas pli bone ol Tokipono.”

Germanujo montras siajn organizajn kapablojn

La venonta jaro, 2015, estos grava jaro por la germana Esperantista movado. En tiu jaro sur germana tero okazos unue en Weißwasser la Junulara E-Semajno, granda novjara renkontiĝo, kaj poste en Wiesbaden la 71-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto. Organizati du tiajn grandajn renkontiĝojn en la sama jaro postulas bonajn organizajn kapablojn, kaj iuj brazilanoj pridubis la germanan pretecon.

Por forigi la dubojn Germanujo sendis al Brazilo 23-kapan delegitaron, kiu en junio kaj julio vojaĝis tra Brazilo kaj montris siajn lertecojn en kunlaboro, komunikado kaj trafi celojn. En okulfrapa prezentado je la 8-a de julio en Bela Horizonte la germana delegitaro konvinkis la ĉeestantajn brazilanojn per sep trafaj argumentoj.

Neniu dubo nun restas pri la germanaj kapabloj, sed ĉu la brazilanoj ankaŭ bone povas organizi IJK-on, tion ni vidos dum la sekvaj tagoj en Fortalezo.



Trafaj argumentoj

Studo montras, ke oni ne manĝu kokojn

Nova, ankoraŭ ne publikigita, studo de la Komisiono de Scienca kaj Faka Agado de TEJO klare montras la malbonan efikon por la sano pro manĝado de koka viando. Pro tio mi, Koko Poso, rekomendas al ĉiuj legantoj de la Pos-Amiko **ne manĝi kokon**. Pri manĝado de bovo, porko kaj aliaj bestoj mi, malkiel la organizantoj de SES kaj Roskilde, havas neniun problemon. Nur ne manĝu kokon. Mi dankas.

ANONCO

La Pos-Amiko lanĉas la konkurson 'Kantaĉo de la jaro', kiu anstataŭas la iaman kategorion Muziko de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĉiuj estas invititaj sendi siajn nomumojn por la plej malbonaj kantoj ĉe <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com/Pos-Amiko>. Poste en la sama loko okazos la publika voĉdonado.

El la tombo de Zombenhof

Esperantistoj estas vojaĝemaj. Ni ĉiuj ŝatas ekkoni novajn landojn, lingvojn kaj kulturojn, kaj plej ofte la vojaĝado eĉ estas nepre ago por revidadi niajn plej karajn amikojn. Aŭ por viziti la mondajn kongresojn. Sed pri tio lasta ja rimarkindas, kiom ofte kongreso okazas en bela turisma loko, kiel ekzemple ĉi-jare en Fortalezo, ĉe la maro.

Kompreneble al ĉiuj estas libere vojaĝi al multekostaj festemaj kongresoj laŭplaĉe, sed alie estas pri la organizantoj, kiuj ne pagas por si mem. La estraranoj, specife tiuj pri kongresoj, ja havas bonan kialon por elekti luksan kongresejon, se ili mem tien iros nepropakoste!

Prefere do oni organizu la sekvan IJK-on en laŭeble malinteresa aŭ malagraba loko. Ekzemple norda Siberio, aŭ en la mezo de Sirio. Aŭ en iu urbeto, pri kiu neni iam ajn aŭdis, sen ajna historia aŭ esperanta signifo, kun nenio por fari. Ekzemple Wiesbaden.

-Lazaro Zombenhof

La horoskopo

Ŝafo: Vi akcidente kreos sekton per interesa rimarko.

Taŭro: Vi estos trafita de terura dormmalsano dum la komitatkunsiĉo.

Ĝemeloj: Vi malkovros, ke plaĝo pli allogas ol paĝo.

Kankro: Ĉi-monate fidu je la voĉoj en via kapo, ili celas bone.

Leono: Vi organizos la IJK-on 2016.

Virgulino: Post la bambumado vi ne plu estos.

Pesilo: Vi preferos kuŝi sur la plaĝo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi havos erotikan sonĝon pri Koko Poso. Ne rakontu pri ĝi.

Aleks Kadar: Vi gajnos la unuan premion en unupersona konkurso.

Sagitario: Vi renkontos iun tute ne interesan fremdulon.

Kaprikorno: Pluku ne la florojn belajn, lasu ilin flori tra somero.

Akvisto: Vi akcidente forviŝos la ununuran kopion de la laborplano de TEJO.

Fiŝoj: Vi plibonigos vian sanon per ne plu manĝi kokan viandon.